

16 JUL 1952



Julio-Aŭgusto 1952 N-ro 11-12

# LA JUNA VIVO

OFICIALA MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO“

Redakcio kaj Administracio: TJO-Centro, West-Graftdijk (NH), Nederlando  
Ĝironumero 382363 Jarabono 3 guld. aŭ egalvaloro

## LA BLANKA MAKULO.

En la lasta tempo, kiam la kinematografio jam estas preskaŭ viv-bezonaĵo de homoj en ĉiuj mondpartoj, multaj Esperantistoj demandas, kial oni ankoraŭ ne komencis fari filmojn parolatajn en Esperanto. La valoro de tiaj filmoj ja estas evidenta: ĉiu nacio de la mondo povus ilin kompreni sen uzo de la nesufiĉantaj titoloj. Kaj la propagandan valoron oni tute ne bezonas akcenti.

Kial do neniu filmas en Esperanto? Kial ni ne povas vidi Esperantajn filmojn, dum ni jam ĉiutage aŭskultas Esperantajn radiostaciojn, legas Esperantajn librojn kaj gazetojn kaj povas eĉ iam vidi Esperantajn teatraĵojn? Ĉu ankoraŭ neniu pensis pri tio?

La afero — bedaŭrinde — estas pli malfacila ol ĝi ŝajnas al ni. Ni do pripensu ĝin detale, de la praktika vidpunkto.

Ni konas filmojn, faritajn ĉe la Internaciaj Junular-Kunvenoj de nia TJO. Ili estas nur en la mallarĝa formato, sed tamen multaj rakontas pri ilia beleco kaj granda propaganda utileco, kvankam ili ne enhavas la normalan parolatan lingvon de la filmitaj personoj, kio kompreneble ne eblas.

Ni ankaŭ konas nian Esperanto-Film-Grupon, kiu eldonas projekciajn filmstriojn, kiuj vere estas belaj kaj interesaj, kvankam nemoviĝantaj kaj kvankam la tekston oni devas aparte legi ĉe ĉiu prezentado denove.

Sed ni sentas, ke tio ĉio ne kontentigas nin. Ni dezirus havi tiajn filmojn, kiaj estas prezentataj en ĉiuj kinejoj kun iu interesa historieto kaj bonaj aktoroj. Ni ne estas la unuaj kun tiu ĉi deziro kaj kelkaj eble miros, ke en Hollywood oni jam faris provojn kun la filmado en Esperanta lingvo. Tamen tiuj provoj, bedaŭrinde, ne sukcesis. Kial? Jen kelkaj malhelpoj, kiuj donas respondon.

La unua afero estas, ke la aktoroj devas bone paroli Esperanton. Sed tio ne estas granda malhelpo, oni tre facile forigus ĝin. La aliaj

estas pli gravaj. Ni scias, ke la film-societoj fabrikas filmojn nur por sia propra profito. Ili do devas fabriki tiajn filmojn, kiajn la homoj tiutempe ŝatas, t.e. kiuj estos multnombre vizitataj. Kaj se oni enkondukus Esperantan filmon en normalan kinejon en iu ajn lando, certe nur tre malmultaj vizitus ĝin, ĉar nur tre malmultaj povus ĝin kompreni. Por ke ili vere komprenu ĝin, oni devus enmeti titolojn en la nacia lingvo. Jes, tio estas la unua maniero. Sed tiuokaze ĉiu film-fabrikanto rifuzos fabriki tian filmon, ĉar la Esperanta teksto fariĝos superflua, almenaŭ de lia komercista vidpunkto, kvankam por la propagando de Esperanto la filmo certe ne estus senvalora.

Ni do supozu, ke la film-societo rifuzis nian proponon kaj ni mem decidis fabriki nian filmon. Tiam, kompreneble, ĝi povos esti prezentata nur en la Esperanto-grupoj, aŭ ĉe privatuloj. Kompreneble en ĉi tiu okazo ni devas fabriki nur mallarĝan filmon, ekzemple 16 mm, ĉar alie la filmado estus tro multekosta. Kaj ni devas supozi ankoraŭ, ke ĉiu grupo havas la eblecon aĉeti aŭ elprunti la bezonotan aparataron.

Alia ebleco, ankoraŭ pli malmultekosta, estus filmi sur la 8 mm mallarĝa filmo. Kompreneble kun la titoloj, ĉar la filmo 8 mm ne povas enhavi la parolatan lingvon, escepte se ni uzus la sistemon de gramofonaj diskoj, kiu, estante ankaŭ sufiĉe malmultekosta, certe sufiĉus por niaj celoj.

Kaj fine, pripensinte ĉiujn cirkonstancojn, almenaŭ la ĉefajn, ni sumigu nian esploron. Ĝis nun oni ankoraŭ ne povas fabriki en Esperanto la normalajn filmojn, sed restas al ni la vojo de amatora filmado. Kaj ni demandas: nu bone, do kial neniu ankoraŭ faris amatoran Esperantan filmon? — Eble faris, eble ne. Sed neniu ankoraŭ organizis la aferon tiel, ke el ĝi profitu la tuta Esperantistaro. Jen, karaj gesamideanoj, jen io nova. Nova laboro por kelke da vigluloj. Afero, kiu havas sendube grandan kaj belan estontecon en nia movado. Kaj imagu la sukceson de la unua kolorplena kaj belega tutvespera Esperanta filmo, prezentata ĉe okazo de la Internacia Junular-Kunveno, ekzemple en 1953-a!

Jen, miaj karaj ĝeamikoj en la vasta mondo, jen unu el la blankaj makuloj sur nia Esperanto-mapo. Verŝajne ĝi estas lando bela kaj fruktodona.

Ĉu ni, ni junaj kaj esperplenaj, esploru ĝin?

George Novotny, 379 Elm Ave West, Montreal-Canada.

---

Nia spirito similas falŝirmilon: Ĝi nur funkcias, kiam ĝi estas malfermita!

Multajn stultaĵojn oni devas fari mem, por kompreni ke ili estas stultaĵoj.

## ĈE LA PACIFIKO.

De Sydney mi per „aŭto-haltigo“ („auto-stop“) vojaĝis 1400 mejlojn sur la orienta marbordo de Aŭstralio dum mia ferio en marto.

Sydney estas la plej malnova urbo en Aŭstralio, sed vi vidu ĝin nun! La granda „Havena Ponto“ („Harbour Bridge“) kunigas la centran, komercan urbon kun la nordaj eksterurbetoj. La aŭtomobiloj, tramoj, elektraj trajnoj, omnibusoj nur apenaŭ sufiĉas por la 1.500.000 loĝantoj. En la eksterurbetoj oni ne vidas grandajn domojn, sed ĉiu familio havas propran dometon — propran kasteleton.

Iru kun mi sur la pacifika vojaĝo.

20 mejlojn post Sydney mi venis en la tipe aŭstralia arbustaro. La urboj estas malproksimaj unu de la alia, ofte mi dum 50 mejloj ne vidis homon. La nomoj de la urboj estas ne nur anglaj, sed la originaj en la aŭstralia lingvo (Murwillumbah, Mullumbimby, Murrurundi, Curra, Gin-gin k.t.p.).

Sur la bordo de New South Wales kaj Queensland estas ĉeno da altaj montoj. La plej alta monto estas la „Warning“ (Averto), kiun malkovris kapitano Cook, kiam li unuafoje venis al la „Terra Aŭstralio“.

Post 4 tagoj mi alvenis en Brisbane, la ĉefurbo de Queensland. Mia aŭto-haltigo bone sukcesis ĝis tie. Brisbane havas multajn pontojn super la sala Brisbane-rivero. Tie mi kampadis kun mia amiko sur golfludejo. La refleksiĝo de la urbo en la rivero dum la nokto tre mirigis min.

De tie la vojaĝo iris malpli bone. Nenie betono, nenie pontoj, sed simplaj travadejoj kaj ofte multnombraj bovaroj kaj ĉevalaroj haltigis min. Tamen mi venis feliĉe en la tropikan zonon. La kreskaĵoj tie pliriĉigas la landon norde. Sed mi ne ŝatus labori en la varmega vetero. La hakado de sukerkano estas bone pagata, sed peza laboro. La sezono daŭras de junio ses monatojn. La foliojn oni bruligas por malpliigi la danĝeron de serpentoj. Poste oni en-vagonigas la hakitan kanon kaj la trajnoj transportas ĝin rekte de la kampoj al la sukermuelejoj.

Ebena ĉi tie estas la ligna regiono. La grandegajn arbojn oni veturigas al havenoj kaj sendas ilin suden.

La minejoj ĉe Gympie kaj Ogmoo estas en montaj distriktoj.

Le ĉefa trafiko iras per ŝipoj kaj trajnoj. Ĉiutage, escepte de sabate kaj dimanĉe, iras unu persona (kaj poŝta) trajno, sed oni vojaĝas per komerc-trajnoj.

La plej malproksima urbo en mia vojaĝo estis Styx, 1400 mejlojn de Sydney. Ĝin mi atingis post 10 tagoj. Ĉirkaŭ la urbo estas la praarbaroj.

Dum mia revojaĝo fortega ciklono kaptis min en Nambucca Heads kaj la vojo fermiĝis por la lastaj mejloj hejmen. La situacio devigis min uzi la trajnon. Mi uzis 76 diversajn aŭtomobilojn, ŝarĝaŭtojn kaj motorbiciklojn, sed mi havis belegan libertempon kaj kun nova ĝojo mi rekomencis la laboron.

B.K., Turramurra, N.S.W., Aŭstralio.

---

**La venonta n-ro aperos en septembro.**

**Junularo, skribu por via propra organo!**

## FOSADO EN ĜARDENO.

En la printempo la pensoj de junulo sin turnas gaje al la amo, sed se vi ne plu estas junulo kaj anstataŭe estas mezaĝulo, viaj pensoj sin turnas (kaj mi timas ne tute gaje) al la ĝardeno.

Do, la pasintan merkredon mi prenis fosilon kaj iris en la ĝardenon. Mi estis certa, ke morgaŭ mi havos doloron en la dorso, kaj mi scivolis, ĉu ne estus pli malkare aĉeti legomojn en la butikoj ol kulturi ilin mem en la ĝardeno.

Malgraŭ miaj pensoj, kiuj ne sin turnis al la amo, mi kune kun mia fosilo iris en la ĝardenon. Mi levis kaj turnis la bonan, brunan teron kaj sentis, ke efektive ĉi tio estas inda laboro. En la fosado estas ankaŭ iu ritmo, kiu estas ŝatinda.

Mi staris dum momento por rektigi la dorson kaj je mia granda surprizo mi vidis, tute proksime al mi, rubekolon.

„Bonan tagon, sinjoro Rubekolo,” diris mi kaj denove mi estis surprizita, ĉar la eta birdo respondis per fajfado. Mi ridis kaj sinjoro Rubekolo saltetis eĉ pli proksimen. Ĝi saltetis pro ekscito kaj malpacienco kaj mi komprenis, ke ĝi deziras, ke mi rekomencu la fosadon. Ĝi atentis ĉiun terpecon, kiun mi turnis. Ĝi zorge inspektis ĉiun kaj okaze paŭzis por kanti sian mallongan kanton.

Neniam antaŭe mi renkontis tiom malsovaĝan birdon, nature vivantan en la libera aero. Ĝi restis ĉe mi dum la tuta posttagmezo kaj mi iom lernis pri ĝi. Kompreneble mi lernis, ke ĝi ne timis min, kvankam nur dimanĉon mi eltrovis kial ne, sed mi lernis ankaŭ, ke ĝi ne frandas vermojn. Mi ĉiam kredis, ke ĉiuj birdoj manĝas vermojn. Nu, sinjoro Rubekolo trifoje levis grandajn dikajn vermojn per sia beko, sed ne por manĝi ilin. Certe ne! Ĝi deziris rigardi sub ili, por trovi aliajn insektojn. Mi ĉiam pensis, ke kiam birdoj kantas, ili malfermas la bekon, sed kiam s-ro Rubekolo kantis, ĝi ne malfermis la bekon. Nur ĝia kolo, ĝuste super ĝia ruĝa brusto, tremis.

Dimanĉmatene mi ree fosis en la ĝardeno kaj kompreneble s-ro Rubekolo revenis. Ĝi restis ĉe mi dum dek kvin minutoj: tiam ĝi fajfis kaj forflugis. Sed ĝi ne forrestis longe. Ĝi revenis kaj kun ĝi venis ankaŭ sinjorino Rubekolo. Ŝi ne estis tiom kuraĝa kiom ŝia edzo kaj tial ne venis tro apude. Tamen, ili longe restis ĉe mi, li tre proksime, ŝi ne tiom kaj ili manĝis kaj saltetis kaj fajfis.

Venis la horo, kiam mi devis iri domon. Mi haltis sur la sojlo kaj rigardis al gesinjoroj Rubekolo. Ili batalis por la tereno, sed estis mallonga batalo, ĉar la merlo gajnis kaj la rubekoloj devis forflugi.

Nu, mi konis tiun merlon. Ĝi sidadis sur la barilo, rigardante mian fosadon kaj la nove turnitan teron. Ĝi timis min (kial, mi ne scias).

Eble, komence ankaŭ la rubekoloj timis min, sed per ia nekomprenebla rimedo ili eltrovis, ke homo ne manĝas insektojn kaj ke merloj manĝas ilin kaj ke tiuj krome estas batalemaj kaj pli fortaj ol ili mem.

A. E. Mitchel, Clecedon, Somerset, Anglujo.

## LA INSEKTOJ KAJ VI.

Ĉu vi estas insekto? ..... Ne!

Ĉu vi estas certa pri tio?

**La akrido** (latine: *Cocustina*) kolektiĝas en svarmoj kaj manĝas ĉion verdan survoje. Malamiko de la terkulturo. Multan monon oni elspezas por forigi ĝin. Oni povas haltigi la naskiĝadon per ŝprucado de oleo sur la lagetoj.

**La avido (homa)** kolektas ion kaj manĝas ion, kion ĝi povas havigi de la Esperanto-movado, se ĝi estas senpaga. Malamiko de la kulturo. Multan monon oni elspezas por instrui Esperanton al ĝi. Oni povas haltigi la naskiĝadon per ŝprucado de laboro.

**La araneo** (*aranea tegenaria domestica*) tektas admirinde fortajn araneajn retojn, en kiuj ĝi kaptas la viktimojn. Ne gravas kiel baraktas la viktimo, ĝi ne povas liberigi sin. La araneo baldaŭ detruas la viktimon.

**La aĉa klubano** („Bonvenon, junulo, kiom juna junulo vi estas, junulo!”) tektas admirinde fortajn retojn, en kiuj li kaptas la viktimojn. Ne gravas kiel baraktas la junulo, li devas aŭdi pri 1904-a kaj la spertoj de la aĉa (pardonu: aĝa!) klubano. La aĝa klubano baldaŭ detruas la viktimon.

**La formiko (myrmex)** laboras sen rekta rekompenco por plibonigi la sacion. Ĉiu formiko havas sian taskon — kaj faras ĝin.

**La T.J.O.-ano** (esperantisto perfekta): Vidu la supran.

J. Kon Walsh, Leeds, Britujo.

## LERTA METIISTO.

Homo havis oran ringon.  
Per la dento de la tempo  
Pereiĝis ringo aĝa,  
Sed la metiisto saĝa  
Diris: „Ho, sinjor', ne gravas!  
El la ring' al ni restadas  
(Se eĉ la beleco estas for)  
Vera, nefalsita or'.  
Tio estas or' el ringo  
Kaj nun per la vortkunigo  
Faros mi la orelringon  
El malnova ringa or'.  
Por saĝul' — facila la labor'.

Vojteck Kliĉ, Ĉeĥoslovakujo.

**Internacia Esperanto-Semajno** estas organizata de „La Aglo”, de 25/7 ĝis 1/8 '52-a. Povos senpage partopreni 20 gejunuloj el div. landoj. Informojn donas E. Bonander, UEA-Delegito, Karlskoga, Svedujo.

## KIE MI PASIGAS MIAJN FERIOJN?

Kiu volas ripozi, tiu veturu al la maro, ebenajo aŭ montaro.

Mi preferas la lastan. Kiu iam estis en la montaro kaj sentis la pacon de la naturo, tiu ĉiam revojaĝos tien por pasigi sian libertempon.

Inter la montoj oni estas for de la ĉiutaga trafiko, sentas la veran kvieton kaj refreŝiĝas por nova laboro.

Oni sunbanas kaj ĝuas la trankvilon de la naturo. Estas vere belege migri kaj grimpi inter neĝo, glacio, rokoj kaj montfloroj (genciano, edelvejso, rondondendro). Sur la pentrindaj montaj herbejoj paŝtas sin la bovaroj. Inter ili ofte kuniĝas cervoj kaj kaproj. Sed precipe vidindaj estas la timema ĉamo saltanta de roko al roko.

Ne nur somere estas bele. Vintre ofte kuŝas kvin ĝis ses metroj da neĝo sur la deklivoj kaj en la valetoj. En terura rapideco oni sur skioj tiam glitas al la valoj. Sed eĉ la plej bela kaj rapida skiglitado ne tiom kontentigas kiom la migrado somere.

Georg Gramsl, Freilassing, Germanujo.

## ORGANIZAJ INFORMOJ.

(Sekretariino Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Ned.).

La anoj, ne vizitontaj la I.J.K. en Ry, povos peti senpagan ekzempleron de la sekretaria kaj kasista raportoj al la sekretariino.

Por jam ĉijare agi laŭ la projektita nova regularo, la tuta estraro eksiĝos. Escepte de la sekretariino, Helmi Veldhuyzen, ĉiuj estraranoj estas reelekteblaj.

La estraro proponas kandidato por la sekretaria funkcio Michel Pilloy en Belgujo.

Oni havos okazon proponi kandidatojn ĝis unu horo antaŭ la jarkunsido en Ry.

**La administra jaro de „La Juna Vivo” iras de septembro ĝis septembro. Vi multe helpas, pagante vian kotizon (3 guld.) antaŭ la 1-a de sept.! Nederlandanoj bonvolu pagi rekte al la kasisto de T.J.O.: G. de Vries, Pav. A.B., R.P.I., Bosdijk 771, Eindhoven. Girnumero 537168.**

## Karaj Legantoj,

Ĉi tiu n-ro de „La Juna Vivo” estas la lasta, kiun mi redaktis. De septembro s-ino Burgler (en Geleen, Ned.) plenumos tiun taskon.

Tamen antaŭ ol adiaŭi vin, mi volas danki ĉiujn, kiuj tiom ofte helpis min per siaj verkaĵoj, kritikoj kaj konsiloj. Espereble vi same helpos la novan redaktorinon, tiam vi kune certe sukcesos fari nian gazeton pli interesa!

N. Kool.

## NIA OKA (Ry, Danujo, 10-17 aŭg.).

(Adreso L.O.K.: Brønshøjvej 62, Kopenhago, Danujo).

Nun nia kunveno jam estas tute proksima! Post nur malmultaj semajnoj malnovaj geamikoj revidos unu la alian kaj novaj geamikoj estos trovataj. Ĉu vi ĉiuj jam kolektis grandan dozon da bonhumoro? Sed kunportu ankaŭ iom da seriozeco kaj antaŭe pripensu la diskutotemojn, kiujn ni aludis en la antaŭa n-ro!

Ĉefperantoj, aŭ, se ili ne povos veni, aliaj anoj, bonvolu kunporti al Ry la nacian flagon.

Por la internacia kabaredo estas ankoraŭ serĉataj kunlaborantoj! Se vi ne jam faris tion, bonvolu anonci vin ĉe Kaj Pedersen.

Ĉe la alveno en Ry ĉiu p. p. ricevos: 1. Plenan programon. 2. Se eble broŝuron pri Ry. 3. Karteton kun nomo, lando. La aktivaj anoj p. p. krome ricevos: 4. Tagordon de la jarkunveno. 5. Projekton de la nova T.J.O.-regularo + tiun pri la kunvenoj (I.J.K.-oj). 6. La sekretarian kaj kasistan jarraportojn.

**Tri listo de partoprenantoj:** 61. G. Rietz, Büsum; 62. H. Hilgendorf, Reinsbüttel; 63. H. Kohlmorgen, Büsum; 64. U. Ernst, Büsum; 65. H. Geil, Büsum; 66. T. Jansen, Büsum (ĉiuj el Germanujo); 67. F. E.Shortland, Ipswich; 68. P. K. Scott, Ipswich; 69. J. M. Burford, Dulais View/Seven Sisters; 70. N. Burford, Mayfield (ĉiuj el Anglujo); 71. A. Andersson; 72. T. R. Olsson (ambaŭ el Halmstad, Svedujo); 73. S. Tompkins, Rickmansworth; 74. J. Beasley, London (ambaŭ el Anglujo); 75. L. Giloteaux, Croix, Francujo; 76. M. Bass, London, Anglujo; 77. A. Konecny, Wien, Aŭstrujo; 78. R. Pfütze, Büsum, Germanujo.

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**Esperanto, Sprache der Völker.** Eine Einführung. (Esperanto, lingvo de la popoloj. Enkonduko). Germanlingva verkaĵo de d-ro S. Ziegler. 32-p. broŝ. libreto, n-ro 536 en la serio Beckers Kleine Volksbibliothek, eld. de Butzon & Becker, Kvelaer Rhld., Germanujo. Prezo 0,30 GM.

**Por nova afero nova maniero.** Kolekto de noveloj el „El Popola Ĉinio”. 195-p. broŝ. libreto, eld. de Fremdlingva Eldonejo, Peking 1952. 13 noveloj de diversaj ĉinaj aŭtoroj, trad. de S. J. Zee, kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj. Prezo ne indikita.

**La plej forta voĉo de la Paco.** Poemaro el „El Popola Ĉinio”. 56-p. broŝ. libreto, eld. de Fremdlingva Eldonejo, Peking 1952, Ĉinujo. 10 poemoj, trad. de S. J. Zee, kun biografiaj notoj pri la aŭtoroj. Prezo ne indikita.

**Hamburg, Germanujo.** Bone presita faldprospekto kun belegaj ilustraĵoj de la granda havenurbo kun esperantaj tekstoj. Interesuloj povas peti la

prospekton al: Fremdesverkehrsverein der Hansestadt Hamburg e.V. (24a) Hamburg I, Germanujo.

**Aŭto-pramŝipo Fredrikstad-Larvik-Frederikshavn**, 4-p. il. broŝureto, esperantlingva informilo pri horoj kaj prezoj, eld. de A. S. Larvik-Frederikshavn-ferjen, Postboks 2443, Oslo, Norvegujo.

**Samen Sterk** (Kune fortaj). Nederlandlingva broŝuro, prezentita de la Nederlanda Studenta Unuiĝo por Mondjuĝistaro, eldonita en kunlaboro kun la Mutual Security Agency (Oficejo por reciproka sekurigo) en Nederlando. Interesuloj petu informojn al Rapenburg 81, Leiden, Nederlando.

**Pernambuco Esperantista**, organo de „Pernambuka Esperanto-Asocio“, Caixa Postal 555, Recife, Pernambuco, Brazilo. N-ro 96/98. Post kelkjara foresto la gazeto reaperis okaze de la Brazila Esp. Kongreso en Recife.

**Esperanto-Infomilo de Int. Grupo Esperantista de Morala Rearmado**. Unupaĝaj folioj de februaro kaj majo. Adr. P. Léendorff, Nordgaarden 7, Køge, Danlando, kie oni senpage povas akiri informojn.

## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Bulgarujo:** Mi dez. kor. k. gesamideanoj el la t. m., interŝ. poŝtm. novajn kaj uzitajn, bildk. fotojn. Todor St. Kehajov, Patriarh Evtimi 121, Bourgas. Jordan Balcandchiev, Asen Zlatarov 20, Bourgas, dez. kor. k. l. t. m., interŝ. poŝtm., poŝtk., gazetojn, fotojn, ktp.

Todor G. Kanev, Troian 94, Burgas, dez. kor. k. interŝ. poŝtk., gazetojn, fotojn, muzikon.

**Ĉeĥoslovakujo:** L. Solc, 20-j., Domsy stal. 17/18, Záluží u Mostu, dez. kor. pri arto, kutimoj, interŝ. bildkartojn kaj gazetbildojn.

**Germanujo:** Georg Gramsl, 16-j., Münchnerstr. 26, Freilassing, dez. kor. kun ĉiuj landoj, prefere per bildkartoj.

Ruth Bohl, 19-j., dez. kor. kun la tuta mondo. Bremen, Lenneweg 15.

**Nederlando:** Juna sinjorino dez. kor. k. aliaj sinjorinoj pri simplaj temoj. E. Hooyberg-Wit, Peperstr. 31, Purmerend.

Per Harley-Davidson motorciklos inter 25 aŭg. kaj 6 sept. tra Belgujo kaj Nord-Francujo Tammo Kanter kaj Felix Kat. Kiuj bv. gastloĝigi ilin dumvojaĝe? Skribu al Lombokstr. 2, Leeuwarden.

Binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo“ ('35/'36 kaj '36/'37) po ... f 1,—  
Bicikloflaĝetoj: f 0,75 — Insignoj (kun ŝraŭbeto) ..... f 0,75  
Kantaro „La Juna Vivo“ f 0,75 — 10 malnovaj E-gazetoj ..... f 1,—  
Ĉiujn librojn, vortarojn kaj esperantaĵojn liveras la TJO-Libro-Servo,  
Hof v. Delftlaan 79, Delft. Ĝirnumero 570720.